FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

STIFTUNG BSW

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita1952 | Numero 2 | Aprilo/Junio 2012

21 Landoj el 4 Kontinentoj



Foto: Zsofia Korody

ĉe la 64. IFEF-kongreso en Herzberg - la Esperantourbo

Jam la 64a IFEF-kongreso, sed la unua IFK, kiu okazis en Esperanto-urbo, en Herzberg am Harz, die Esperanto-Stadt

Ĝi okazis de la 19. ĝis 25.majon 2012 en la malgranda, sed ĉarma harca urbeto. Cetere,estis jam la sesa IFK en Germanio!



Foto: Siegfried Krüger

Jam en la stacidomo Herzberg estis la gekongresanoj salutata esperantlingve dum la tuta alventago,la 19-an de majo. Tion brave plenumis pere de platformaj lautparoliloj nia LKK-ano Siegfried Krüger. La sabato estis la kutima tago inter gajaj malnovaj geamikoj aŭ konatiĝo kun "novkongresanoj".

Aparte menciinda estas la inaŭgura tago, la dimanĉo: la malferma ceremonio okazis komence kiel kutime. Malfermo, salutvortoj de urbestro S-ro Walter en germana kaj esperanta lingvoj, de afergvidantino de BSW, S-ino Zavoral, de ILEI-prezidanto Mac Gill kaj de GEFA-prezidanto Meinel. Memkompreneble salutis la kongreson ankaŭ la reprezentantoj el la 21 landoj de 4 kontinentoj! Entute 160 kongresanoj venis al Herzberg. Tra la programo gvidis lerte nia LKK-ano Ull-mann. Interrompita estis la diversaj paroladoj de kulturaj kontribuoj, ekz.de Hercbergaj lernantinoj, kiuj recitis la poemon "la

vojo" kaj la kantoj de BSW-virkoruso el Hanovro. Finfine deklaris la IFEF-prezidantino Rodica Todor la 64-an IFK malfermita.
Sekvis alia kulmino: marŝo tra la urbo, flankita de gekolegoj en fervojistaj uniformoj, naciaj flagoj, tamburmuziko kaj afabla scivolemo de multaj urbanoj. Sur la urboplaco denove alparolis la urbestro kaj substrekis la facilan interkompreniĝon pere de Esperanto. Sed--ne estis jam la fino de nia marŝo: plia celo estis la stacidomo, kie la urbestro inaŭguris la novajn nomojn „Esperanto-placo" kaj „Joachim-Gießner-Vojo". J.Gießner estis dum multaj jaroj IFEF- kaj GEFA-prezidanto, sed ankaŭ ĉefo de la stacio Herzberg. La tutan festan ceremonion akompanis la blovorkestro Herzberg-Sieber.



Foto: Siegfried Krüger

Post multnombre vizitata ekumena diservo prezentis la folklora grupo "Harz-Klub Pöhlde" sin per belaj Harcaj kantoj kaj dancoj kaj ricevis meritan aplaŭdon.
Lundon matene akceptis la vicurbestro en kavalira salono de la impona, alte situata Welfenkastelo la IFEF-estraron, landajn delegitojn kaj LKK-anojn, okazis reciprokaj dank-esprimoj kaj transdono de donacetoj al la urba reprezentanto, i.a. IFEF-blazono. Tuj poste estis la nepublika komitatkunsido. La ne tiamaniere okupitaj gekongresanoj havis eblecon rigardi ekspozicion en la kastelo pri Esperanto kaj fervojo. Ankaŭ okazis preleg-prezento de la "Interkultura Centro Herzberg"/*ICH*/. Oni povis konstati, ke "ICH"estas interesa eksperimento por demonstri interkulturan interkompreniĝon per unu lingvo, do:Esperanto. Ĝi postulas multe da energio; kelktempe helpas en- kaj eksterlandaj volontuloj. Tamen,ni esperu pri pli da Hercbergaj Esperantistoj!



Ekskurso al Torfhaus, fone: Brocken (1141m) Foto: Siegfried Krüger

Dum la sekvintaj tagoj okazis la kutimaj kongresaj aranĝoj kiel kunsidoj de komisionoj, i.a .faka komisiono kun(re)elekto de la vere laboremaj funkciuloj Jan Niemann, Danio, Ladislav Kovar, Chechio kaj Heinz Hoffmann,Germanio

- nova estis komuna lingvoseminario IFEF-ILEI kun ties prez.Mac Gill
- la kongresa balo kun diversaj sovaghaj dancemuloj...
- la PLENKUNSIDO:
  estis legitaj diversaj mesaghoj,i.a. de radio Havannah kaj pola Netradio
- ni honoris la mortintajn IFEF-anojn
- aprobis la raportojn de estraranoj kaj cefkomitatano
- aprobis la protokolon de 63.IFK en Liberec
- budgheto kaj kotizo
- aprobis la 65-an IFK en Bordozo,Francio
  malaprobis GEFA-proponon de 3.1.2011 pri redukto de tranoktkostoj por estraranoj dum IFKoj pro malkreskanta nombro de kongresanoj kaj decidis novan trakton nur 2013!

Fakaj prelegoj/fervojaj aktualajhoj:

- la ĉefan prelegon ellaboris kaj prezentis bonkvalite la konata dana geedzparo Lene kaj Jan Niemann:La baltmara tunelo - Nova interligo al Skandinavio. Ĝi kunligas la germanan insulon Fehmarn kun la dana insulo Lolland kaj estas 17,6 km longa.
- aktualaĵoj:
  # Sciindaĵoj pri Harcaj Etŝpuraj Fervojoj /Heinz Hoffmann
  # Fervoja projekto Stuttgart 21 /Siegfried Krüger
  # Metroo en Riad / Lene Niemann
  # Trafika salono de Universitato Pardubice / Jaroslav Matushka
  # Nova silkvojo / Ladislav Kovar
  # Rememoro je Joachim Gießner /Manfred Retzlaff
  # Elstaraj kroataj Esperantistoj / Zlatko Hinsht
  # Novaĵoj de Bulgaraj Fervojoj / Pavlin Petrov Boevski

Dum du vesperoj prezentis la Hamburga kantisto Ralph Glomp kaj la Italo Emanuele Rovere la postan vesperon belajn kantojn,ankaŭ subtenata de nuntempaj teknikiloj.



Foto: Siegfried Krüger

Alia interesa fervojtema vespero estis la prezento de origine germanlingva filmo "175 jaroj de Fervojoj en Germanio",lerte esperantlingve akompanata de Heinz Hoffmann.

La oferto pri ekskursoj ebligis duontagajn vizitojn al universitata urbo Göttingen, unu el la plej malnovaj en nia lando, al Goslar,la UNESCO-kulturheredaĵo kaj al Unukornula Groto proksime de Hercberg.
La tuttagan ekskurson tien fervoje al Nordhausen kaj per la etŝpura vaportrakcia Harcfervojo al la t.n. bunta urbo Wernigerode, reen per autobuso partoprenis preskaŭ 60 personoj kaj ĝuis la naturon de Harcmontaro, la plej norda germana mezmontaro.



Foto okaze de trajnŝanĝo en Drei Annen: trajnestro, R. Todor, G. Bolognesi fotis: Siegfried Krüger

Venis la vendredo,la lasta kongrestago: Prezentis sin la venonta IFK-regiono Bordozo en Francio.Tutcerte alloga celo kaj por espereble multnombra kongresanaro!
Dum movadaj aferoj estis diskutitaj multaj gravaj federaciaj problemoj, ekz. (mal)kresko de membraro kaj de landaj asocioj, IFEF kaj FISAIC, diverseco de fervojaj entreprenoj,
Sekvis la ne evitebla, sed solena fermo:
Ĝi estas la okazo danki al ĉiuj, kiuj helpis aŭ ebligis la kongreson, jen
dank al la Esperantourbo kaj ties administracio sub urbestro Walter,al la ICH kiel grava motoro en preparo de 64-a IFK,al ĉiuj aliaj helpantoj, al la teamo de "Artemis"-kongresejo. Ni ne forgesu nin mem,la GEFA-LKKòn!
Vere la lasta momento estis la solena transdono de kongresflago al la francaj gekolegoj!

Ĉion Bonon kaj Ĝis revido venontjare en Bordozo!

☺ ☺ ☺

Jiaozi (und ein verbrannter Bauch)

Was das mit Esperanto und der Duisburger Esperantogruppe zu tun hat? Wir werden sehen.

Von Rolf Terjung

Endlich landete die Maschine aus Peking auf dem Frankfurter Flughafen, und Heinz konnte seine hübsche chinesische Freundin Lu in seine Arme schließen. Er spricht kein Chinesisch und sie kein Deutsch. Was bleibt als Lösung? Sie sprachen beide Esperanto, waren sprachlich also auf gleicher Augenhöhe. Sie lernten sich auf einer Geschäftsbesprechung in China kennen, wo nicht nur Chinesisch und Englisch, sondern auch Esperanto gesprochen wurde.

Auf einem der Gruppenabende der Duisburger Esperantogruppe, die regelmäßig zweimal im Monat stattfinden, lernten auch wir Lu kennen. Lu lud uns spontan zu einem gemeinsamen Weihnachts-Abendessen mit chinesischen Gerichten ein. Lu war nicht nur charmant, sondern auch eine hervorragende Köchin, wie sich herausstellte.



Lu Wang in der Küche

Unsere Gruppe war jetzt noch internationaler als sonst: Lu aus China, Rosi in Russland geboren, Elena aus Bulgarien und wir aus Deutschland. Von Verständigungsschwierigkeiten keine Spur, dank Esperanto. Dann wurden die Frauen in die Küche gebeten und kochten unter Anleitung von Lu und mit munteren Reden „Jiaozi“ und andere chinesische Kostbarkeiten. Was sind Jiaozi? Jiaozi sind mit nach chinesischer Kochkunst gefüllte Teigtaschen, sind lecker und gesund und ähneln im weitesten Sinne Piroggen, Cannelloni oder Maultaschen.



Rosi hilft

Nach dem Essen überraschte uns Lu mit einem anmutigen chinesischen Fächertanz, den einige Mutige unter Anleitung von Lu später auch versuchten zu tanzen. Stephan, der einige Worte Chinesisch spricht und auch Schriftzeichen zu deuten weiß, zeigte uns danach einige Kung Fu-Übungen, die er bei einem Chinaaufenthalt gelernt hatte.

Es war also ein munterer Esperantoabend, der sich nicht nur ums Essen, sondern auch um chinesische Kultur und Politik im Allgemeinen drehte.

Nun kommt der verbrannte Bauch zur Geltung. Ich hatte einen trocknen Husten und weckte dadurch Mutterinstinkte in unseren Damen. Außer tröstenden Worten und verschiedenen Ratschlägen aus nun vier Nationen, gab Lu mir sofort chinesische Biopillen zu schlucken. Meine bulgarische Frau riet mir zum Tee aus Heilkräutern, die sie suchen würde. Die Dame aus Russland schlug vor, ein Tuch mit Wodka zu tränken und nachts auf die Brust zu legen. Meine Frau bevorzugte abends die russische Methode, tränkte ein Tuch mit Wodka und wickelte es um meine Brust. Vielleicht lag es an den Prozenten, denn der Erfolg war durchschlagend. Am nächsten Morgen waren meine Brust und mein Bauch feuerrot und verbrannt. Der Husten blieb. Vielleicht mochte er keinen Wodka.



Lu Wang beim Fächertanz



Joachim-Gießner-Weg in Herzberg Foto: Siegfried Krüger

Redaktfino por FE 3/2012 estos la 15.08.2012
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de
Spenden auf Konto 953 729 bei Sparda-Bank Hessen (BLZ 500 905 00)